

Kio apartigas esperanton de la ceteraj lingvoj
Claude Gacond, 215-a radioprelego, 1967.11.22 & 1967.11.25

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĉar en esperanto ĉiu elemento de la lingvo estas senŝanĝa kaj memstara, la afiksaro sin riskis formi senpere vortojn. Tiu fakto apartigas esperanton de la ceteraj eŭropaj lingvoj, eĉ aglutinaj.

A.- En esperanto, kiel en la ceteraj eŭropaj lingvoj, ekzistas ekzemple sufikso formanta diminutivojn. El la vortoj **domo**, **bela**, **ridi**, **libro**, per aldono de la sufikso **et**, esperanto kreas la diminutivojn **dometo**, **beleta**, **rideti** kaj **libreto**. En tio estas nenio eksterordinara.

Cl.- Sed en esperanto la sufikso **et** forlasis sian sufiksian funkcion por fariĝi memstara vorto. Tio ne okazas en la ceteraj eŭropaj lingvoj. Sufikso restas sufikso, dum en la zamenhofa idiomo ne estas eksterordinare diri: *La **eta** princo, li **ete** laboras kaj **ege** manĝas, lia inteligento vere **etas**.*

A.- La esperanta vorto **dometo** estas komparebla al la franca **maisonnette** kaj al la germana **Häuslein**. Sed en la franca al neniuj venis la ideo paroli pri **eta domo**, **une ette maison**. La samo por la germana. Imagu germanon diranta: **ein leines Haus** anstataŭ **ein Häuslein**.

Cl.- Lingvistike, kio estas interesa, estas la konstato, ke tiu senpera uzado de la esperanta afiksaro sin trudis nur iom post iom. Atenta lego de la *Unua Libro* de 1887 pravas la latentan eblecon de tiu senpera uzado de la esperanta afiksaro per unu sola ekzemplo. En la poemo *El Heine* la sufikso **eb** estas memstara adverbo. Aŭdu tiun historie gravegan version:

A.- « Ne **eble**! » ŝi al mi rediras.

Cl.- Ĉar baldaŭ Zamenhof riskos aliajn similajn formojn, oni povas sin demandi, kial li donis nur unu solan ekzemplon de memstara sufikso en sia unua verko. Verŝajne li ne volis ŝoki la eŭropan lingvosenton. Tiu **eble** estis speco de provbalono.

A.- Gaston Waringhien provis dati la unuan aperon de senpera uzado de la ĉefaj esperantaj afiksoj. Li donas interesan kronologion, kiu pravas, ke se kelkaj sufiksoj tuj kuraĝis akiri aŭtonomecon, aliaj sufiksoj longe kontentiĝis je sia klasika sufiksa tasko.

Cl.- Verŝajne unue la skriba lingvo ludis gravan rolon por emancipigi la afiksaron. Poste la situacio renversiĝis. Hodiaŭ komparo inter la literatura lingvo kaj registrado de debatoj pravas, ke la ofteco de memstaraj prefiksoj kaj sufiksoj estas pli alta en la parola uzo, ol en la skriba uzo de esperanto.

A.- Tiu konstato estas tre grava kaj pravas, ke esperanto vere vivas. En ĉiu lingvo ekzistas kvazaŭ kronologia diferenco inter la parola kaj skriba lingvo. La parola lingvo estas ĉiam pli riskema, ol la literatura idiomo, kiu obeas al la oficialaj gramatika kaj vortara normoj.

Cl.- Jen la kronologio proponita de Gaston Waringhien. Jam en 1887 en la *Dua Libro* Zamenhof riskis novajn senperajn uzojn de afiksoj. Oni trovas **eblo**, **indo** kaj **ree**.

A.- La postan jaron oni trovas sub lia plumo: **ano** kaj **dise**.

Cl.- La aliaj verkistoj lin imitis kaj sin montris eĉ pli riskemaj, ol li. Grabowski proponis **ema** kaj **eksa**, Kofman **ino** kaj **iĝi**.

A.- La gazeto *La Esperantisto* diskonigos la formojn **eco**, **estro**, **igi**, **eta** kaj **ingo**.

Cl.- Por trovi la formojn **aro** kaj **ilo**, kiuj hodiaŭ estas tiom oftaj, oni devos atendi 1894.

Kio apartigas esperanton de la ceteraj lingvoj
Claude Gacond, 215-a radioprelego, 1967.11.22 & 1967.11.25

A.- Kaj por la formo **ejo** eĉ 1908. Ŝajnas, ke tiam la parola lingvo estis jam pli riskema, ol la literatura aŭ gazeta lingvo. Reformo de esperanto estas proponata sub la nomo **Ido**, sed en nia literaturo la memstara sufikso **ido** aperas nur post la naskiĝo de la lingvo **Ido**.

Cl.- **Aĵo** kaj **ulo** atendis pli ol dudek jarojn por emancipiĝi, **eki**, **adi**, **ega**, **ismo**, **aĉa**, **umo** multe pli longe, eĉ ĝis kvardek jaroj.

A.- La kunmetaĵoj, kie ne troviĝas verbaj, substantivaj aŭ adjektivaj radikoj, ankaŭ aperis nur iom post iom. Se ekzemple **aliĝi** aperas en la *Unua Libro*, oni devas atendi dudek jarojn por trovi **aliĝilo**.

Cl.- Kiam en la universitatoj ekzistos katedroj pri nia lingvo, interesaj esploroj povos esti sisteme entreprenataj pri tiu temo : *La emancipiĝo de la afiksaro en la lingvo esperanto*. Tiuj studoj reliefigos la konstantecon de la evoluo de la lingvo de Zamenhof.

A.- Neniu arbitra gramatika aŭ vortara malpermeso bremsas tiun evoluon. Nur influoj de la ceteraj eŭropaj lingvoj bridis tiun evoluon. Ĉar en la naciaj lingvoj malestas formoj, la unuaj esperantistoj ne sentis la bezonon tamen povi esprimi tiujn formojn en la lingvo internacia.

Cl.- Sed hodiaŭ, kiam la parola uzo forte progresas, kiam la blinda imitado el la naciaj lingvoj malaperas, sin trudas novaj revoluciaj formoj. Jen ekzemplo :

A.- Ĉar la prahomoj ne estis matematikistoj, ili povis kontentiĝi pri kalkuloj, kiuj malofte superis kelkajn milojn. Pro tio en la naciaj lingvoj mil estas ĝenerale la plej granda numera adjektivo. Kial esperanto devus blinde imiti tiun arbitran kutimon ? Ekzistas du paralelaj sistemoj por nombradi. Kial unu haltus post mil ? Aŭdu :

Cl.- Unu kaj unuo, du kaj duo, tri kaj trio, kvar kaj kvaroj, kvin kaj kvinoj, ses kaj sesoj, sep kaj sepo, ok kaj okoj, naŭ kaj naŭoj, dek kaj deko, cent kaj cento, mil kaj miloj. Poste, laŭ niaj lernolibroj, povus ekzisti nur miliono kaj miliardo.

A.- Parolante pri vilaĝo oni povas diri : *En mia komunumo loĝas tri mil homoj* aŭ *En mia komunumo loĝas tri miloj da homoj*.

Cl.- Subite, parolante pri lando, oni nur povas diri : *En mia lando loĝas tri milionoj da homoj*. La formo *En mia lando loĝas tri **milion** homoj* laŭ la lernolibroj ne ekzistas.

A.- Esperanto neniam povos akcepti tiajn arbitrajn malpermesojn. En ĝi ekzistas nek vortaj nek gramatikaj tabuoj. Pro tio en la parola uzo hodiaŭ sin trudas formoj kiel :

Cl.- *Sur nia planedo vivas pli ol tri **miliard** homoj*. *La distanco Tero-Luno estas tricent okdek mil kilometroj*, kaj *la distanco Tero-Suno estas cent kvindek **milion** kilometroj*.

A.- Ne estas, ĉar la naciaj lingvoj ne kapablas sin adapti al la matematika erao, ke esperanto ilin devas imiti. Imitado al la naciaj idiomoj ludis en esperanto tre etan rolon. Ĝin anstataŭis racia serĉado kiel eble plej precize kaj belstile esprimi sian penson.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-